

Guilherme Fians

University of St Andrews, Skotlando / Scotland

Kontraŭ la esceptismo de Esperanto(logio): unuapaŝa etnografia aliro al tiu studkampo

Resumo: Pluraj esperantologoj esploras pri Esperantujo surbaze de arkiva esploro kaj etnografia kapolaboro. Per tiuj esplorteknikoj, oni povas pli bone kompreni, ekzemple, kiel kaj kial homoj efektive uzas la lingvon kaj kiel esperantistoj perceptas terminojn kiel *Homaranismo* kaj *samideano*. Tamen, kion oni malkovrus se oni uzus etnografian kapolaboron, krom bibliografian kaj arkivan esploron, por studi Esperantologion? Unuapaŝa aliro montras kiel tiu studkampo grandparte baziĝas sur interkonsentiĝo. Tio kontrastas kun la ĉefaj studkampoj kiuj nutras Esperantologion per teorioj – t.e. lingvistiko, sociologio, antropologio, historio kaj literaturaj studoj – kiuj disvolviĝas pere de konstanta konflikto inter fakuloj kiuj subtenas malsamajn metodologiajn kaj teoriajn alirojn. Pro sia ĝenerala manko de teoriaj malkonsentoj kaj de rektaj debatoj, Esperantologio disvolviĝas per la akumuliĝo de aliroj kiuj apenaŭ dialogas inter si. Surbaze de analizo de fakaj artikoloj kaj konferencoj koncernantaj Esperantologion kaj Interlingvistikon, tiu ĉi artikolo montras kiel Esperantologio diversmaniere sekvas la idealigitan sintenon de Esperantujo pri paca interkompreniĝo – kiu, siavice, deflankigas la pli polemikajn kaj disputigajn trajtojn kiuj karakterizas sciencajn debatojn. Fine, mi argumentas por pli da rekta dialogo – kaj (kial ne?) konfrontoj – inter Esperantologiaj perspektivoj, tiel ke tiu studkampo povu pli vaste kontribui al la fakoj ĉe kiuj ili originis.

Ŝlosilvortoj: Interfakeco; Scienca disvolviĝo; Esperantologiaj teorioj; Lingvistiko; Etnografio; Fakaj polemikoj.

Enkonduko

Esperantologio jam de pluraj jardekoj firmiĝas kiel studkampo: unue, pere de ĉia fakesplorado pri Esperanto kaj, iom post iom, pere de la instituciigo de la studkampo fare de konferencoj, publikaĵoj kaj esplorfondaĵoj. Kiel kaŭzo kaj konsekvenco de tio, ankaŭ Esperanto firmiĝas kiel studobjekto. Dank'al la vojoj por Esperantologio unue proponitaj de fakuloj kiel Paul Neergaard (1942) kaj Eugen Wüster (1955), oni povas pli bone kompreni, ekzemple, kiel planlingvoj disvolviĝas, kiel esperantistoj perceptas terminojn kiel *Homaranismo* kaj *samideano*, kiel lingvo-uzo ŝanĝiĝas de unu epoko al la alia

kaj kiajn konsekvencojn tiaj trajtoj efektivigas en la parolkomunumo. Pluraj publikaĵoj (i.a. Tonkin 1987; Tonkin kaj Fettes 1996; Blanke 2003; Tonkin 2007) proponas trarigardojn de tiuj studoj, inter kiuj la plej lastatempa estas tiu de Humphrey Tonkin kiu aperas en ĉi tiu numero de EES (Tonkin 2022). En ĉi tiu lasta artikolo, krom prezenti ĝeneralan bildon pri Esperantologio, Tonkin ankaŭ proponas kelkajn direktojn kien esperantologoj povas iri.

Studkampoj ne nepre disvolviĝas antaŭen, sed en plurajn esplorindajn direktojn. Tamen, rimarkinda trajto de Esperantologio jam notita de Detlev Blanke (2015) estas, ke dum Esperantologio antaŭenpaŝas, ĝi kelkfoje iras en cirkloj. Pro la fakto ke Esperantologio estas interfaka spaco kaj ke esperantologoj legas malsamspecajn bibliografiojn el siaj originaj studkampoj, oni plurfoje ne atente legas kaj sufiĉe engaĝigas pri la esperantologia bibliografio kiu supozeble kunigus onin. Rezulte de tio, oni reinventas la radon, ripetante jam ekzistantajn analizojn. Dum tiu esperantologia rondirado, tamen, pluraj fakuloj alportas teoriojn kaj argumentojn de lingvistiko, sociologio, antropologio, historio, literaturaj studoj, tradukado kaj interkultura komunikado en Esperantologion, tiel riĉiĝante ĉi tiun studkampon. Tiu observo devigas ke oni demandu: je kiu grado esperantologoj alportas teoriojn kaj argumentojn de Esperantologio al aliaj studkampoj?

Pluraj esperantologoj baziĝas sur etnografia kampo laboro, krom bibliografia kaj arkiva esplorteknikoj, por studi Esperantujon. Tamen, kion oni malkovrus se oni uzus tiujn teknikojn por studi Esperantologion? Ekde la komenco de mia doktoriĝo (en 2015), mi konatiĝas kun la vasta fakbibliografio pri la fenomeno Esperanto (lingvo, literaturo, movado, komunumo kaj tiel nomata “kulturo”), kadre de mia intereso pri Esperanto kiel soci-antropologia studobjekto. Dum la disvolviĝo de mia kariero inter antropologoj, lingvistoj kaj historiistoj en Eŭropo kaj Latinameriko, mi ankaŭ partoprenas la agadon de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj de Esperantic Studies Foundation, kaj frekventas la Esperantologiajn Konferencojn de CED, la Internaciajn Kongresajn Universitatojn de UEA, la Interlingvistikajn Simpoziojn de Poznano, kaj plurajn ne-esperantologiajn fakkongresojn ĉeestatajn kaj foje kunorganizatajn de esperantologoj.

Surbaze de tiu sperto, mi ne proponas detalan kaj ampleksan surrigardon de Esperantologio kaj Interlingvistiko kiel studkampoj. Tian senton de perspektivo jam brile donas la supremenciitaj studoj de Tonkin, Fettes kaj Blanke – samkiel la aliroj al Interlingvistiko de Schubert (1989), Barandovská-Frank (2020) kaj Gobbo (2020). Male, mi proponas mian fakan sperton kiel antropologo kiu studas homojn – inter ili, esperantologojn – kiel unuapaŝan etnografian aliron al Esperantologio. Surbaze de esploro etnografia, arkiva

kaj bibliografia, mi analizos ne la tuton de Esperantologio, sed kelkajn referencojn kaj debatojn elektitajn – ĉu pro mia faka koncentriĝo, ĉu pro la disponebleco de datumoj – por proponi vojojn por ke Esperantologio havu pli efikan voĉon kaj influon ekster la limoj de Esperantologio mem.

Por tiu analizo, gravas konsideri ke la diversaj sciencaj studkampoj plejparte faras sian laboron kadre de stabilaj strukturoj kiuj kunigas fakulojn – ekzemple esplorcentroj, universitataj fakultatoj, sciencaj asocioj kaj simile. Esperantologio, siaflanke, apenaŭ kalkulas je tiaj strukturoj, kaj la kunigo de esperantologoj estas limigata al jaraj konferencoj kaj malmultaj fakrevuoj. Krom tiuj aspektoj, estas notinda la fakto ke esperantologiaj spacoj estas plejparte enkadrigitaj de Esperantujo kaj ne de universitatoj, disvolviĝante precipe sub la egido de esperantaj organizoj kaj kongresoj. Ĉu tiuj trajtoj ludas iun rolon en la manieroj kiel Esperantologio progresas? Provante respondi tiun demandon, mi konsideras la influon de la studobjektoj (t.e. Esperanto kaj Esperantujo) en la studkampoj (t.e. Esperantologio).

Unu el la kernaj trajtoj de Esperantologio kiun ĉi tiu artikolo celas reliefigi estas ke ĉi tiu studkampoj grandparte baziĝas sur interkonsentiĝo. Tio kontrastas kun la ĉefaj studkampoj kiuj nutras Esperantologion per teorioj – t.e. lingvistiko, sociologio, antropologio, historio, literaturaj studoj kaj interkultura komunikado – kiuj disvolviĝas pere de konstanta konflikto inter kontrastaj metodologiaj, analizaj kaj teoriaj aliroj. Pro sia ĝenerala manko de teoriaj malkonsentoj kaj de rektaj debatoj, Esperantologio disvolviĝas per la akumuliĝo de aliroj kiuj apenaŭ dialogas inter si.

Ĉi tiu artikolo komenciĝas per diskuto de kelkaj el la lastatempaj disvolviĝoj de esperantologiaj esploroj kiuj, por firmigi Esperanton kiel fakan esplorobjekton, senintence tendencas emfazi la unikecon de la esperanta lingvo, komunumo kaj movado. Tiel, tiuj aliroj izolas esplorojn pri Esperanto kaj malemfazas la gravecon de ĉi tiu esplortemo por aliaj studkampoj. Dum Esperantologio sin trovas relative izolita fake, ĝi sin turnas al Esperantujo, tiel alproksimiĝante al la interkompreniĝema sinteno de Esperantujo kaj distanciĝante de la pli disputema etoso kiu karakterizas la sciencajn debatojn kiuj rezultigas la disvolviĝon de la sciencoj. Fronte al tiu pejzaĝo, mi diskutas kvar ekzemplojn pri eblaj vojoj kiuj povus igi Esperantologion pli alirebla al nefakaj publikoj, pli ekvilibra kaj vastiga studkampoj, kaj pli malferma al la disvolviĝo de la studkampoj per teoriaj polemikoj. Fine, ĉi tiu artikolo invitas esperantologojn al rekta dialogo kaj debato, argumentante ke interkompreniĝo ne nepre egalas al interkonsento.

La esceptismo de Esperanto(logio)

Por la fondiĝo de sociologio kiel scienco, ĝiaj pioniroj devis konvinki aliajn fakulojn ke estas aspektoj de la socia vivo kiujn oni ne povas klarigi per ekonomikaj, politikaj kaj psikologiaj analizoj (Durkheim 1912; Mauss 1923 [2007]; Weber 1978). Same, la pioniroj de antropologio bezonis pravigi indiĝenajn popolojn (tiam nomatajn “primitivaj popoloj”) kiel legitimajn sciencajn studobjektojn (Frazer 1908; Stocking Jr 1987). Stabiligi studkampojn preterpasas la bezonon validigi studobjektojn kaj pravigi la bezonon pri aparta fako por studi ilin, kaj la samo okazis pri Esperantologio. Tamen, dum diversaj studkampoj agnoskis Esperanton kaj kiel studobjekton (vidu Couturat kaj Leau 1903; Forster 1982: 181-182) kaj kiel lingvon taŭgan por la sciencoj pli ĝenerale (Spillman 1909) en la fruaj jaroj de la lingvoj, tiu akcepto ŝajne ŝanĝiĝis tra la dudeka jarcento. Tio spronis ke Esperantologio reagu al la deflankigo de Esperanto fare de fakuloj pri lingvistikaj kaj humanistikaj studkampoj.

Unu el la plej konataj okazoj de deflankigo de Esperanto kiel studobjekto venas el formala lingvistiko, kiel konsekvenco de la generativa gramatika aliro grandparte disvolvita de Noam Chomsky (2006). Chomsky defendas, ke la priskribo kaj analizo de naturaj lingvoj baziĝu sur la studo de la aplikado de oniaj kognaj (denaskaj) strukturoj al la konstruado de laŭgramatikaj frazoj en la koncerna lingvo. Tiamaniere, oni bone komprenas lingvon kiam oni komprenas – el la vidpunkto de siaj indiĝenaj parolantoj – kiaj sintaksaj strukturoj, vorto-ordoj kaj frazoj estas laŭgramatikaj kaj kiaj estas kontraŭgramatikaj. Tamen, Esperanto ne konformas al tiu ĉomskia kategorio pri naturaj lingvoj ĉar estas malmultaj eksplicitaj gramatikaj reguloj en Esperanto kaj ĉar Esperanto ne kalkulas je indiĝenaj parolantoj.¹ Pro tio, anstataŭ mobilizi siajn kognajn strukturojn por formi esperantajn frazojn, Esperanto-parolantoj utiligas siajn antaŭkonojn pri aliaj lingvoj. Ĉar ne eblas analizi la gramatikecon de esperantaj frazoj samkiel de la tiel nomataj “naturaj lingvoj”, formala lingvistiko ne agnoskas Esperanton kiel plenrajtan lingvon, sed kiel lingvon parazitan de aliaj (vidu Fians 2021: 1-2). Pro la fakto ke Esperanto ne bonvenas kiel studobjekto de lingvistikaj aliroj simpatiaj al tiu de Chomsky, lingvistoj kiuj esploras pri la sintakso de tiu lingvo ofte trovas la agnoskon de siaj eltrovoj limigitaj al esperantologoj.

Simila malakcepto de Esperanto kiel studobjekto manifestiĝas en la literaturo pri sociaj movadoj. Sociologoj kaj antropologoj kiuj esploras pri sociaj movadoj pli ofte priskribas tiujn movadojn kiel kolektivajn agadon per kiu aktivuloj agas konforme siajn kontraŭhegemoniajn perspektivojn kaj prezentas sian malkontenton rilate al iu aparta temo, premante institu-

1 Ĉi tie mi uzas la terminon proponita de Miner (2010, 2011), pri kio mi diskutos poste.

ciojn, registarojn kaj aliajn aŭtoritatojn por la plenigo de siaj postuloj (della Porta kaj Diani 2006; Snow 2013; Castells 2015). Tiamaniere, idealtipaj sociaj movadoj estas tiuj kiuj agadas pri temoj koncernantaj al homaj rajtoj, laborkondiĉoj, socia malegaleco, genra malegaleco, rasismo, esprimlibereco, paco kaj mediprotektado. Sociologio kaj antropologio fokusiĝas je sociaj movadoj kies agado influas plurajn aspektojn de la vivo: batali kontraŭ kapitalismo, kontraŭ rasismo aŭ por vegetarismo signifas ne nur partopreni protestojn surstrate, sed ankaŭ ŝanĝi onian vivon entute por konformigi ĝin al oniaj valoroj kaj politikaj perspektivoj. Krome, idealtipaj sociaj movadoj kalkulas je momentoj kiam politikaj ŝancoj faras iliajn celojn pli atingeblaj: la paca movado iĝas pli urĝa dum militaj tempoj, samkiel la laborista movado gajnas videblecon kiam politikistoj aŭ entreprenistoj minacas laboristajn rajtojn (Calhoun 1993; Marullo kaj Meyer 2004).

Kiam oni pensas pri idealtipaj sociaj movadoj, la Esperanto-movado ne estas sisteme inkluzivita en tiuj fakaj diskutoj. Oni povas konjekti pri eblaj kialoj: ĉu pro la fakto ke, krom la disvastigo de la lingvo, ne estas aliaj komunaj trajtoj kiuj klare karakterizas esperantistojn kiel aktivulojn? Ĉu pro la fakto ke Esperanto ne havas tiom ampleksan ŝanĝpotencon en kolektiva vivo kompare kun mediprotektado aŭ genra egaleco? Ĉu pro la fakto ke la universaligo de Esperanto estas foje rigardata nuntempe kiel fiaskinta celo? Sendepende de la eblaj kialoj por tiu deflankigo, estas fakuloj kiuj ja defendas la agnoskon de la Esperanto-movado flanke de aliaj movadoj – ekzemple, montrante ke historie movadoj pri internaciaj helplingvoj gravis (Garvía 2015) aŭ ke esperantistoj estis grandparte politikaj aktivuloj influaj dum pluraj protestoj kaj revolucioj (Alcalde 2022).

Simila situacio regas kiam temas pri movadoj por minoritataj lingvoj. La Esperanto-movado efektive havas trajtojn komunajn kun tiaj movadoj: komuna deziro pri la kreskiĝo de siaj parolkomunumoj, konstanta klopodo diversiĝi kaj intensigi la uzadon de la koncerna lingvo en pluraj aspektoj de la vivo kaj parole kaj skribe, disputoj pri kiel daŭre normigi la lingvon kaj stabiligi nehegemonian lingvan aŭtoritaton, inter aliaj (Urla 1988; Jaffe 1996, 1999; Woolard 2016). Tamen, Esperanto efektive ne estas minoritata lingvo, tiel ke ĝi estas ekskludita de iu ajn dialogo kun fakuloj kiuj esploras tiujn movadojn.

Alia konsiderinda faka deflankigo de Esperanto estas tiu ĉirkaŭ kontrastaj difinoj pri komunumo. Kelkaj argumentas ke, malgraŭ la fakto ke Esperanto estas lingvo, Esperantujo ne estas parolkomunumo, sed ja komunumo pri praktiko (Gobbo 2021). Tio baziĝas sur la argumento pri tio ke, samkiel membroj de religiaj grupoj, legokluboj kaj keglo-kluboj, la kialoj por ke esperantistoj emu renkontiĝi kaj konsistigi komunumon kuŝas je iliaj komunaj interesoj kaj agadoj. Intertempe, aliaj argumentas ke Esperantujo

estas popolo – aŭ, efektive parolkomunumo – kiu kuniĝas per nur unu elemento: la lingvo mem (Tonkin 2006). La fakto ke esperantistoj komune agnoskas apartajn esperantlingvajn normojn kaj rimedojn (Duranti 1997) ebligas ke ili komunikiĝu, rekonu la lingvan kompetentecon unu de la aliaj, provu diveni onian gepatran lingvon surbaze de onia parolmaniero en Esperanto kaj rekonu specifajn esperantlingvajn referencojn pri libroj kaj kantoj (Fians 2021: 12-13). Tamen, la statuso de Esperantujo fronte al aliaj parolkomunumoj estas ofte pridubata pro sia supozebla unikeco (Stria 2015b). Aliflanke, dum sociologoj alproksimigas Esperantujojn al diaspora komunumo pro ĝia transnacia ekzisto (Wood 1979), ĝi ne enkadriĝas inter aliaj disigitaj komunumoj kiuj iam vivis koncentritaj je sama teritorio.

Esperantologoj ofte preteratentas la distingon inter komunumo kaj movado, tiel ke la samaj aŭtoroj parolas neprecize pri Esperantujo kaj pri la Esperanto-movado foje kiel sinonimoj, foje kiel maniero kontrastigi ambaŭ. Sendepende de kio estas la aro de esperantistoj, la ampleksa esperantologia bibliografio pri tiuj temoj sisteme substrekas la aspektojn kiuj apartigas Esperantujojn de la tradiciaj difinoj pri komunumo, tiel ke esperantistoj aperas kiel eksterdifina kaj unika grupo.

Kiel konsekvenco de la faka deflankigo de Esperanto kaj la reagoj de esperantologoj al tio, Esperanto kaj ĝiaj parolantoj iĝas ofte pentritaj per siaj mankoj. Unuflanke, Esperanto estas komparebla al aliaj lingvoj, la Esperanto-movado estas komparebla al minoritatlingvaj kaj sociaj movadoj, kaj Esperantujo estas komparebla al aliaj komunumoj. Aliflanke, Esperanto, la Esperanto-movado kaj Esperantujo aperas kiel tute aliaj, kiuj ne konformas idealtipajn alirojn kaj difinojn. Tiaj aliroj firmigas Esperantorilatajn studobjektojn kiel esceptojn, kaj tiel situas ilin en la margeno de fakaj debatoj. Kiel antaŭvideble, el la escepteco de Esperanto rezultas la esceptismo de Esperantologio kiel studkampo.

Esperantologio prave starigas interfakan spacon kiu bonvenigas kaj videbligas esplorojn kaj fakdebatojn ĉirkaŭ esperantaj temoj. Tra la historio, Esperantologio baziĝis sur teoriaj kaj analizaj aliroj el pluraj studkampoj kaj por pravigi Esperanton kiel studobjekton kaj por emfazi la unikecon de tiu lingvo, movado kaj komunumo. Dume, tiu aliro pri unikeco senintence helpis izoli Esperantologion pro la fakto ke aliroj al “unikaj” Esperanto-rilataj temoj apenaŭ aplikiĝas al aliaj temoj. Tiel, Esperantologio iĝas kvazaŭ tute aparta studkampo, kies kontribuoj prave ebligas ke oni pli bone komprenu Esperanton kiel fenomenon, sed kies valoron oni apenaŭ agnoskas ekster la esperantaj fakmedioj. Tio rezultas en bedaŭrinda unudirekta interŝanĝo: evidentiĝas la influoj de lingvistikaj, literaturanalizaj kaj sociologiaj teorioj en Esperantologio, sed maloftas la influo de esperantologiaj aliroj kaj teorioj en lingvistiko kaj humanistikaj studkampoj.

Esperantologio: unuapaŝa superrigardo

Kvalitaj esplormetodoj ne povas provizi nin per detala profilskizo pri kiuj kaj kiaj estas la esperantologiaj fakuloj. Tamen, trarigardo en la arkivoj de esperantologiaj publikaĵoj kaj konferencoj ebligas ke ni komprenu komunajn trajtojn de kelkaj el la spacoj kiuj konsistigas tiun studkampon. Analizante la biografiojn de prelegantoj de la Esperantologiaj Konferencoj, de aŭtoroj de artikoloj ĉe la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies* kaj de kontribuantoj de kunredaktitaj volumoj (kiel tiuj de Blanke kaj Lins 2010; Gotoo, Kimura kaj Vergara 2018; kaj Koutny, Stria kaj Farris 2021), oni povas tuj noti ke Esperantologio sisteme kunigas homojn el malsamaj fakaj fonoj. El konferenc-programoj kaj publikaĵ-enhavtabeloj, oni trovas inter la kontribuantoj plejparte lingvistojn, fakulojn pri literaturo, fakulojn pri kulturaj studoj, historiistojn, sociologojn, antropologojn kaj ekonomikistojn. Tamen, estas rimarkinde ke, inter tiuj kontribuantoj, ankaŭ troviĝas kuracistoj, farmaciistoj, komputil-sciencistoj, inĝenieroj, matematikistoj kaj astrofizikistoj.

Kontraste al tio, simpla kontrolo de la programo de fakaj konferencoj kiel tiuj de Linguistic Society of America, International Association of Applied Linguistics aŭ International Sociological Association evidentigas ke prelegantoj en tiuj konferencoj estas preskaŭ nepre lingvistoj kaj fakuloj pri lingvo-instruado aŭ sociologoj, respektive. Ĉar Esperantologio manifestiĝas interfake, eble estus pli juste kontrastigi ĝin kun aliaj tiaj studkampoj, kiel ekzemple studoj pri scienco kaj teknologio. Tamen, en la fako scienco kaj teknologio, dum historiistoj kaj sociologoj de la sciencoj esploras pri iu ajn scienco, astrofizikistoj kaj kuracistoj plej ofte esploras ne pri “sciencoj” ĝenerale, sed pri siaj koncernaj studkampoj – astrofiziko kaj medicino, respektive.

Pro la grandeco de la supremenciitaj studkampoj, eblas organizi grandskalajn kongresojn kalkulante nur je kontribuoj de doktoriĝantoj kaj doktoroj pri la koncernaj fakoj. Pri Esperantologio, ne okazas same. La relative malmultaj fakuloj kiuj konsistigas tiun studkampon ludas rolon por ke tiom da fakoj estu bonvenaj kaj por ke oni ne nepre bezonu doktoriĝon aŭ ligan al esplor-institucio por esti agnoskata kiel fakulo pri Esperantologio. Pro la bonvenigo de kontribuantoj ankaŭ el fakaj fonoj netradiciaj, Esperantologio ne principe konformas al la idealtipaj postuloj de lingvistikaj kaj humanistikaj studkampoj. Kiel Peter Forster (1982: 368) asertas, la fakto ke ne ĉiam Esperanto estas akceptita kiel studobjekto en lingvistikaj kaj humanistikaj medioj instigas tion, ke Esperanto restu grandparte studobjekto de amatoraj lingv-

istoj kaj fakuloj, margene de aliaj studkampoj.² Tia amatoreca sinteno videblas, ekzemple, en la bibliografio de esperantologiaj fakartikoloj kaj libroĉapitroj, kie plurfoje oni trovas tiom da magazin-artikoloj kaj blogaĵoj kiom da tradicie fakaj referencoj. Tiel, multo de la kono produktita sub la egido de Esperantologio malsukcesas trovi akcepton ekster la limoj de tiu studkampo.

Tiamaniere, la fakaj spacoj kiuj konsistigas Esperantologion tendencas esti pli akceptemaj, malfermaj kaj bonvenigaj ol idealtipaj fakaj spacoj. Je la nomo de Esperantologio kunsidas ne lingvistoj kun antropologoj, ne matematikistoj kun historiistoj, ne astrofizikistoj kun Esperanto-aktivuloj, sed esperantologoj kun esperantologoj. Ĉu tiu sinteno memorigas ion al vi, kara leganto? Surbaze de la supremenciitaj etnografiaj, arkivaj kaj bibliografiaj materialoj, mi argumentas ke Esperantologio diversmaniere sekvas la idealigitan sintenon de Esperantujo pri inkluziveco, diverseco kaj reciproka interkompreniĝo. Dum Zamenhof (2001: 6-7) priskribis Esperantujon kiel kunvenejon kie “membroj de la plej malsamaj popoloj staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj”, same Juan Régulo Pérez (1961: 14) provis malinstigi fakajn esperantologiajn debatojn pri la *Fundamento* por eviti “interfratan lingvobatalon”. Se kaj membroj de Esperantujo kaj fakuloj pri Esperantologio estas rigardataj kiel fratoj en granda rondo familia, indas eviti malkonsenton kaj fervorajn debatojn inter ili, ĉu ne?

Pro tiuj trajtoj, Esperantologio firmiĝas kiel komforta medio kie fakuloj – ne nepre pri lingvaj kaj humanistikaj temoj, ne nepre doktoroj aŭ doktoriĝantoj – estas ĝenerale bonvenaj. La kerna postulo por kontribui al tiu studkampo estas havi ion fakecan por diri pri Esperanto – eĉ se nur surbaze de onia memsperto. Tio aldonas kroman komplikan tavolon al tiu pejzaĝo: estas fajna distingo inter esperantologoj kaj Esperanto-aktivuloj, kio foje rezultigas pli entuziasme subtenajn kaj malpli rigorajn fakalirojn pri Esperanto-rilataj temoj.

Dum mankas universitataj fakultatoj kaj sciencaj asocioj por regule kunigi esperantologojn, tiu studkampo disvolviĝas kaj kunvenigas siajn kontribuantojn ĉefe kadre de Esperantujo. Tiuj kiuj havas ion fakecan por diri pri Esperanto estas regule invitataj paroli prie en lokaj Esperanto-asocioj, prelegi kadre de naciaj kaj internaciaj Esperanto-kongresoj, kaj verki ĉapitrojn en kunredaktitaj volumoj pri Esperanto. Konsekvence, la atingo de pluraj el tiuj kontribuoj (kiuj aperas plejparte nur en Esperanto) restas limigita al Esperantujo kaj apenaŭ aliras la eksteresperantajn fakajn

2 Laŭ Forster (1982: 368), lingvokreado ĝenerale estis je la manoj de amatoraj lingvistoj kiuj, kiel Zamenhof, okupiĝis profesie pri aliaj karieroj kaj nur flanke sin dediĉis al lingvaj aferoj.

debatojn. Tio plifortigas la paradokson de interfakeco: dum tiu interfaka spaco kunigas fakulojn el diversaj fonoj, ĝi parte iĝas studkampo en si mem, kiu apenaŭ kontribuas reen al la studkampoj kiuj originis ĝin.

La fakto ke Esperanto(logio) havas tiom da potencialo sed ne tiom da videbleco ekster si mem levas la demandon: kion faka esplorado pri Esperanto povas kontribui al teorioj pri lingvistiko, antropologio, sociologio, tradukado, historio kaj interkultura komunikado? Kaj kiel Esperantologio povus eniri pli prestiĝajn kaj ampleksajn sciencajn rondojn? For de la celo doni definitivan respondon al tiuj demandoj, mi diskutas ĉi sube kvar esperantologiajn esplorojn kaj verkojn kiuj brile ilustras la potencialon de Esperantologio preter siaj propraj limoj.

Por Esperantologio pli alirebla al nefakaj publikoj

Unu el la laboroj kiu modele firmigas sian influon ekster la kutimaj esperantologiaj rondoj estas la arkiva esploro de Ulrich Lins pri la akcepto kaj malakcepto de Esperanto fare de registaroj dum la dudeka jarcento. Lia ĉefverko estas *La danĝera lingvo*, unue publikigita en Esperanto (Lins 1973) kaj plurfoje reviziita (1990 kaj 2016a).

Per ampleksa analizo pri la uzoj de Esperanto en partoj de Eŭropo kaj de Azio, Lins detale rakontas la historion de Esperanto laŭ la vidpunkto de plurspecaj subpremoj, cenzuroj kaj persekutoj. Jam antaŭ la publikigo de la fundamentoj de la lingvo, Zamenhof alfrontis problemojn pri cenzuro. Tra la historio, la lingvo estis plurfoje asociita al grupoj malamikaj kaj minacaj laŭ la vidpunkto de eŭropaj kaj aziaj naci-ŝtatoj. En Germanio dum la hitlera reĝimo, parolantoj de la “lingvo de judoj kaj komunistoj” estis persekutitaj kaj Esperanto-agado estis malpermesita.³ Siavice, en Sovetunio, tuj post la revolucio de 1917, Esperanto estis perceptata kiel helpilo por fortigi internacian solidarecon inter laboristoj kaj por subteni la internaciigon de la proleta kulturo. Tamen, en sekvaj etapoj de la postrevolucia soveta historio – ĉefe dum la stalinisma periodo – Esperanto fariĝis malamiko de la soveta ŝtato, ligita al kosmopolitaj kaj burĝaj pensmanieroj kaj, sekve, subpremata en tiu mondoparto. Intertempe, en aziaj landoj, registaroj malbone rigardis Esperanton kiel alportilon de okcidentaj kaj modernaj ideoj – kiuj, siaflanke, povus minaci la tradiciajn kaj naciismajn perspektivojn difuzitajn de tiuj naci-ŝtatoj.

Per abundaj detaloj, *La danĝera lingvo* modele “montras, ne diras”, kiel sugestas la devizo por verkistoj. Ĉi tiu verko ne tutsimple konstatas

3 Indas konsideri ke Lins emfazas ke la “danĝero” de Esperanto ne ekzistas nur laŭ la vidpunkto de totalismaj reĝimoj. En la hitlera Germanio ankaŭ estis esperantistoj kiuj uzis la lingvon por internacie disvastigi naziajn ideojn kaj kiuj denuncis al la registaro “samideanojn” kiuj agis kontraŭ la interesoj de la germana ŝtato.

ke esperantistoj estis persekutitaj pro siaj ligoj kun la lingvo. Male, Lins donas al ni legantoj ĉiujn ilojn por ke ni mem konkludu ke subpremoj, persekutoj kaj malakceptoj okazis. Krome, la esploro sur kiu baziĝas tiu libro materiigas la ligojn inter Esperanto kaj la fluoj de ideoj kiuj, en apartaj cirkonstancoj, estis konsiderataj danĝeraj. Prezenta al la mondo kiel lingvo por ĉiuj, Esperanto grandparte fariĝis lingvo por revoluciuloj, komunistoj kaj sennaciistoj en kelkaj mondopartoj. La danĝero asociita al tiuj ideoj ampleksiĝis al Esperanto – kaj reen, el Esperanto al la ideoj ligitaj al ĝi – tiel ke Esperanto-parolantoj ĝenerale iĝis potencialaj minacoj al naci-ŝtatoj.

El ne-esperantologia vidpunkto, ĉi tiu libro aliras temaron kiu transiras plurajn kernajn temojn de moderna historio. Krome, la plej lastatempa esperantlingva eldono (Lins 2016a) kaj sia du-voluma traduko al la angla (fare de Humphrey Tonkin) (Lins 2016b, 2017) entenis ampleksan revizion, kun la forigo de diskutoj pri Azio, sed kun aldono de pluraj fontoj kiuj iĝis alireblaj de la aŭtoro post la disfalo de la Berlina Muro kaj de Sovetunio.

La libro ankaŭ entenas interesajn konkludojn el la vidpunkto de sociolingvistiko, malgraŭ ke ĉi tiuj aspektoj ne estas aparte analizataj tiel. La lingvo mem (gramatiko, semantiko, sintakso, ktp.) ne estas danĝera, sed la manieroj uzi la lingvon efektive aperas kiel minacaj laŭ ŝtataj vidpunktoj. Tio rekte koncernas la diskutojn, ekzemple, de Joshua Fishman (1965), kiu demandas kiel, kiam kaj kial oni uzas apartajn lingvojn por apartaj konversacioj. La fakto ke ie kaj iam en la historio Esperanto estis plej verŝajne pli ofte uzata por paroli pri politiko ol pri ĉiutagaĵoj diras ion pri la lingvaj ideologioj kaj la parolkomunumo malantaŭ ĝi.

Laste kaj plej grave, la plej notinda merito de ĉi tiu verko estas, ke ĝi estas vaste menciata de ne-esperantologaj esperantistoj. Malmultaj fakuloj produktas verkojn konatajn ekster siaj fakoj, kaj Ulrich Lins sukcesis ne nur grandioze stari en Esperantologio kaj iom kontribui al historio, sed ankaŭ superi fakajn rondojn – grandparte pro la fakto ke la libro estis tradukita el Esperanto al ok naciaj lingvoj. Kompreneble (kaj, iusence, bedaŭrinde), tio ne signifas ke esperantistoj efektive kaj atente legas la libron – kio evidentiĝas per la simplecaj aliroj de multaj esperantistoj al la argumentoj pri persekutado kaj subpremo. Tamen, *La danĝera lingvo* modele invitas nefakulajn esperantistojn al fakaj debatoj kie ili kutime sentas sin eksteruloj. Scienca disvastigo estas laboro kiun oni devas fari paŝon post paŝo, kaj Lins certe donis grandan paŝon por la popularigo de Esperantologio inter la ĉefa nefaka celpubliko de lia studo kaj ekster strikte fakaj rondoj.

Por ekvilibras kaj vastigaj aliroj al Esperantologio

Plia studo kiu okupas la bretojn de pluraj lingvistoj, historiistoj kaj de ĉiuj esperantologoj estis verkita de iu kiu ne sin identigas kiel esperantologo, sed kies laboro ja rilatas al Interlingvistiko. En *La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo*, Umberto Eco entreprenas la gigantan taskon analizi kelkajn el la senfinaj klopodoj fare de eŭropanoj krei, rekrei kaj retrovi lingvojn tra la jarcentoj. Tiu verko aperis originale en la itala (Eco 1993) kaj estis tuj tradukita al la angla (1995) kaj aliaj naciaj lingvoj. La esperantlingva versio aperis tuj poste (Eco 1996), tradukita de Daniele Mistretta. La senprokrasta tradukado de la verko en plurajn lingvojn esprimis la tujan agnoskon de ĝia graveco por fakaj diskutoj.

Komencante per la serĉado de la antaŭbabela lingvo kiu supozeble antaŭis ĉiujn aliajn, ĉi tiu verko ankaŭ analizas kelkajn el la centoj da lingvoj konstruitaj por solvi homajn problemojn – ĉu problemojn pri la malkongruo inter logika pensmaniero kaj ĝiaj lingvaj esprimoj, ĉu pri internacia komunikado en plurlingva kaj imperiisma mondo. Kadre de la ĉi lastaj lingvoprojektoj, Eco kompreneble priesploras Esperanton, sed ene de multe pli ampleksa pejzaĝo kie ĉi tiu lingvo prave aperas kiel nur unu el pluraj konstrublokoj de tiu rakonto.

La aliro de Eco komenciĝas per la konsidero laŭ kiu pluraj kulturoj kaj popoloj ĉirkaŭ la mondo iam provis krei lingvon kiel solvon por la limigoj pri komunikado inter popoloj. Tamen, se ĉi tiu libro temas pri “la historio de revo kaj de serio da fiaskoj” en la klopodo realigi tiun revon (Eco 1995: 19; mia traduko el la angla), kial gravas kvazaŭ enciklopedia analizo de lingvaj fiaskoj? Responde al tiu demando, la fakto ke tiom da popoloj pensis simile pri lingva diverseco kaj komunik-problemoj kiel faligenda baro, kaj ke tiu temo estas tiom persista en Eŭropo kaj aliloke tra la jarcentoj, donas al lingvokreado privilegian pozicion el kie oni povas pli bone kompreni mondhistorion.

Tiusence, ne gravas ĉu Esperanto aŭ aliaj konstruitaj lingvoj estas konsiderataj sukceso aŭ fiasko: gravas ke ilia ekzisto kaj rezisto rivelas ion al ni pri homaj manieroj imagi la mondon. Ĉar ne gravas ĉu Esperanto sukcesas aŭ malsukcesas, la prezento de Eco pri Esperanto estas sufiĉe ekvilibra. Eco priskribas Esperanton pozitive, sed ne optimisme aŭ idealisme – kiel esperantologoj plurfoje faras – kaj tio favoras ke lia studo estu konsiderata serioze de ne-esperantistaj fakuloj. Oni povus argumenti ke ĉiuj interlingvistoj same situigas Esperanton kadre de pli ampleksa lingva pejzaĝo, kaj tio parte pravas. Tamen, la fakto ke plejparto de la interlingvistoj estas Esperanto-parolantoj – kaj ne Ido- aŭ Interlingua-parolantoj – instigas Interlingvistikon fokusiĝi sur Esperanto malproporcie kompare kun aliaj

planlingvoj, foje per prezentado de Esperanto kiel la nura sukcesa planlingvo. Kaj tio revenigas nin al la kontribuo de Eco.

La fakto ke, laŭ Eco, la graveco de Esperanto kaj aliaj planlingvoj ne kuŝas nepre sur la disvolviĝo de vortprovizo nek sur la grandeco de la parolkomunumo de tiuj lingvoj, konsistigas interesan lecionon por esperantologoj kaj esperantistoj. Tiuj kiuj malakceptas Esperanton ofte minimumigas ĝian gravecon per la argumento laŭ kiu ĝi neniam efektive iĝis lingvo universale kaj vaste uzata. Bedaŭrinde, tia kvanta argumento pri la malmulteco de parolantoj kaj limigita vastigo de la uzo de tiu lingvo estas foje uzata de esperantologoj por minimumigi la gravecon de planlingvoj kiel Ido aŭ Interlingua. Tamen, la insisto pri kalkulado de sukcesoj kaj malsukcesoj tiusence limigas onin al onia starpunkto. Se oni rigardas Idon kaj Interlingua-n el la vidpunkto de Esperanto, ili ja havas malmultajn parolantojn. Se oni rigardas Esperanton laŭ la vidpunkto de hegemoniaj lingvoj kiel la angla, Esperanto ja havas kvazaŭ sensignifan parolkomunumon. Ĉu tio estas sufiĉe akceptebla kialo por preteratenti tiujn lingvojn? Argumentante por la graveco de konstruitaj lingvoj fronte al la plej ampleksa politika kaj religia pejzaĝo pri pensmanieroj en Eŭropo, Umberto Eco montras ke ne.

La kerna kontribuo de tiu aliro kiu povus pli ofte inspiri esperantologojn estas montri ke esplorado de la daŭre ekzistanta lingvo kaj fenomeno Esperanto helpas ke ni komprenu kiel apartaj manieroj imagi la mondon pere de la konstruado kaj uzado de planlingvoj ekzistas kaj rezistas tra la jarcentoj. Tiusence, aliri Esperanton kiel studobjekton signifas ne nur analizi la funkciadon de la lingvo, sed ankaŭ la funkciadon de la pensmanieroj kiuj pravigas ĝin kaj kiuj rilatas al specifaj perspektivoj pri kosmopolitismo, internaciismo, revolucioj, universaleco, justeco, pureco, diverseco – kaj, finfine, eĉ al la maniero laŭ kiu oni imagas la limojn de la mondo kaj de la homaro. Sendepende de kiom da homoj scipovis aŭ scipovas Esperanton aŭ aliajn planlingvojn, gravas konsideri ke paroli tiujn lingvojn signifas multe pli ol tutsimple *elparoli* ilin.

Por pli oftaj neforgeseblaj debatoj

Reen al la fakto ke Esperantologio disvolviĝas ekster universitataj medioj, mi argumentas ke, rezulte de tio, la sinteno de Esperantologio respiegulas tiun de Esperantujo. La plej karakteriza trajto de tio estas ke Esperantologio grandparte firmiĝas sur la maniero per kio la interkompreniĝa etoso de Esperantujo fariĝas interkonsentiĝo inter esperantologoj. Tiu faka spaco bazita sur interkonsentiĝo kontrastas kun la modernaj perspektivoj pri scienca disvolviĝo. Sociologoj kaj filozofoj ofte argumentas ke la sciencoj

progresas pere de konsentoj, malkonsentoj, revolucioj, polemikoj kaj disputoj. Dum kelkaj asertas ke kritikemo estas la motoro de scienca disvolviĝo kaj de la produktado de novaj konoj (Popper 1959), aliaj argumentas ke la sciencoj dependas je paradigmo-ŝanĝoj por progresi (Kuhn 1996).

Laŭ la ĉi-lasta perspektivo, kiam sciencistoj forte malkonsentas inter si, tiu malkonsento devigas ilin sindediĉi pli intense por subteni siajn teoriojn kaj esplorrezultojn. El tiuj debatoj, unu skolo venkas, ŝanĝas la ĝistiaman hegemonian scienca paradigmon kaj helpas decidi la vojon sekvotan por la koncerna scienco, dum la konkurencaj aliroj kaj skoloj estas deflankigitaj kiel memoroj de la pasinteco de la koncerna studkampo. Malgraŭ la ĝenerala bildo pri koheraj “sciencaj komunumoj” de kemiistoj, lingvistoj kaj sociologoj, novaj konoj kaj teorioj disvolviĝas ne nepre harmonie, sed pere de disputoj kiuj incitas reagojn kaj devigas la koncernajn sciencistojn plibonigi siajn alirojn kaj repensi siajn konkludojn (Bourdieu 1975; Rowbottom 2011).

Samkiel la Universalaj Kongresoj de Esperanto staras kiel diplomatiaj spacoj kie oni diskutas inkluzive, interkulture kaj senkonflikte, spacoj de Esperantologio aperas kiel grandparte interkonsentiĝemaj rilate al sciencaj aliroj. Ĉeestante esperantologiajn konferencojn aŭ legante esperantologiajn publikaĵojn, oni rimarkas ke malmultas polemikoj kaj ke kontribuantoj apenaŭ tuŝas temojn malkonsente. Tiu sinteno alproksimigas Esperantologion al la ideala sinteno de Esperantujo, sed dume kontrastigas Esperantologion kun la fakaj studkampoj kiuj nutras ĝin per teorioj.

Unu el la elstaraj esceptoj tiusence estis la debato pri la pasivaj formoj de verbaj participoj kaj ĝiaj signifoj en Esperanto. Historie konata kiel la *-ata/-ita-diskuto*, tiu debato estis instigita de artikolo de Teo Jung en *Lingva Kritiko* (1932), kiu tuj alfrontis reagojn de Gaston Waringhien (1932), Porto Carreiro Neto (1933), Kálmán Kalocsay (1933) kaj pluraj aliaj. Post komenca debato en *Lingva Kritiko* kaj *Heroldo de Esperanto*, la apero de du volumoj kunigante tekstojn de Teo Jung por atismo (Jung 1960, 1961) instigis pli grandskalan reagon, kiu entenis la grupe verkitan volumon *La Zamenhofa Esperanto: Simpozio pri -ata/-ita* (De Hoog kaj aliaj 1961). Tiel la temo gajnis eminentecon en la 1960aj jaroj, kiam tiu debato apartigis esperantologojn kaj membrojn de la Akademio de Esperanto en du skolojn: itistojn kaj atistojn.

Esence, tiu polemiko temis pri kiel pasivigi frazojn kiel “Subite lin trafis kuglo” (Reta Vortaro 2022). La pasivigo de ĉi tiu frazo postulus kunmetitan verboformon, sed ĉu estus pli ĝuste “Subite li estis trafita de kuglo” aŭ “Subite li estis trafata de kuglo”? Oni povas kompreni tiun debaton pere de frazo uzata kiel ekzemplo de Waringhien (1967: 25): “Ĉar mia aŭto estis riparata ĉi-matene, *mi povis/mi ne povis* veturi al nia bankedo”. La saman frazon oni povas legi en du kontraŭsencaj manieroj.

Unuflanke, itistoj subtenis aspektisman aliron, tiel ke por ili la distingo

inter *-ata* kaj *-ita* estas kontrasto inter ago kaj agoplenumiĝo. Tiel, itistoj dirus “Ĉar mia aŭto estis riparata ĉi-matene, mi ne povis veturi al nia bankedo”. Por tiu skolo, *-ata* emfazas neplenumitecon aŭ nefinitecon de ago kiu daŭras, tiel ke la riparado de la aŭto ne finiĝis antaŭ la horo de la bankedo.

Aliflanke, atistoj sin apogis sur tempisma aliro, laŭ kiu la distingo inter *-ata* kaj *-ita* implicas kontraston inter antaŭtempeco kaj samtempeco de ago. Tiel, ili dirus “Ĉar mia aŭto estis riparata ĉi-matene, mi povis veturi al nia bankedo”. Laŭ la tempistoj, *-ata* emfazas antaŭtempecon, tiel ke je la horo de la bankedo la aŭto jam estis plene funkcia kaj povis veturigi la koncernen homon ĝustatempe.

Multa inko fluis por tiu afero, kiu disvolviĝis dum jardekoj pere de fakartikoloj, redaktitaj volumoj, leteroj interŝanĝitaj inter membroj de la Akademio kaj debatoj en Akademiaj kunsidoj. Tiu polemiko plejparte solviĝis kiam la Akademio de Esperanto voĉdonis kaj decidis subteni la itisman aliron, tiam agnoskante itismon oficiale (Akademio de Esperanto 1967).

Por la celoj de ĉi tiu artikolo, gravas konsideri ke tio estas plej verŝajne la plej memorinda polemiko en Esperantologio, al kiu homoj daŭre aludas.⁴ Pro la statusa devo de la Akademio resti fidela al la zamenhofaj lingvo-principoj, tiu debato estis parte finigita de la aŭtoritato de Zamenhof, pro la fakto ke la zamenhofa uzo de Esperanto estis pli itisma ol atisma. Tamen, tiu afero levis klerigajn debatojn kiuj implikis intensan revizion de esperantologia kaj ĝeneral-lingvistika fakliteraturo kaj kiuj, finfine, helpis (re)difini kaj poluri la regantajn perspektivojn pri la lingvaj ideologioj malantaŭ Esperanto.

Por la kuraĝigo de polemikoj kiuj daŭre atendas respondon

La ĵus prezentita polemiko ilustras tion, kion sciencoj faras pli bone: levi demandojn, pridubi aksiomojn kaj pensigi homojn. Polemikoj ŝanĝas sciencajn paradigmojn, tiel riĉigante nian komprenon pri temoj kiuj unuavide ŝajnas evidentaj. Do, kial ne kuraĝigi tiajn debatojn?

Per provo fari tion, mi atentigas la leganton pri relative lastatempa artikolo de Ken Miner (unue publikigita esperante en 2010, republikigita dulingve esperante-angle en 2011) pri la lingvistika statuso de Esperanto-denaskuloj. Miner skizas fundamentan distingon inter *denaskaj* kaj *indiĝenaj*

4 Tio, kio plej similas al tia polemiko estis la interesa rilato inter substantivo kaj verbo (notita de Szerdahelyi 1976) en kazoj kiel: oni balaas per balailo, sed brosas per broso. Nuntempe, iom polemikaj estas la supre diskutitaj difinoj pri Esperantujo, ĉu parolkomunumo, komunumo pri praktiko, popolo, movado, kulturo kaj/aŭ identeco (Wood 1979; Tonkin 2006; Stria 2015b; Caligaris 2021; Fians 2021; Gobbo 2021; inter aliaj).

lingvo-parolantoj⁵ kaj uzas Esperanton por operaciigi siajn proponitajn konceptojn. Tamen, tiu enhavriĉa distingo povas potenciale aplikigi al iu ajn lingvo.

Surbaze de la supreprezentita formalisma aliro de Chomsky, Miner asertas ke esti indiĝena parolanto de lingvo entenas disvolvi esprimkapablon en la koncerna lingvo pere de ĝia akirado kaj konstanta uzado kontakte kun ampleksa parolkomunumo dum la infanaĝo. Kontraste, se infano nur uzas la koncernan lingvon kiel hejman lingvon kun sia familio kaj se tiu infano uzas tiun lingvon notinde pli parole ol skribe, li/ŝi tendencos ripeti la apartaĵojn de la lingvo-uzo de la gepatroj – kiel gramatikajn erarojn, nekutiman vortprovizon kaj parolmanierojn kiuj rezultiĝas plejparte el ilia gepatra lingvo. La samo okazas al infanoj de migrantoj kiuj uzas la gepatrajn lingvojn de siaj gepatroj hejme, sed kiuj eksterhejme uzas la oficialan aŭ kutiman lingvon de la regiono/lando kie ili loĝas.

Indiĝenaj parolantoj okupas prestiĝan pozicion en formala lingvistika teorio. Male al tiuj kiuj lernas lingvon post la infanaĝo, indiĝenaj parolantoj evoluigas kognajn (nekonsciajn) sistemojn dank'al kiuj ĉi tiuj parolantoj internigas la funkciadon de la koncerna lingvo, kio ebligas ilin uzi la lingvon "nature". Tiel, formala lingvistiko konsideras indiĝenajn parolantojn de etnaj lingvoj kiel provizantojn de normoj pri la lingvo (Chomsky 2006: 23–25; Miner 2011). La samo ne validas por denaskaj parolantoj: el tio rezultas ke, laŭ Chomsky, Esperanto ne estas lingvo⁶ kaj, laŭ Miner, priesperanta lingvistiko estas neebla.

La difino pri lingvistiko de Miner – "la tasko de la lingvistiko estas malkovri la principojn, kiuj kunligas frazojn kaj signifojn" (2011: 26) – estas neadekvate supraĵa kaj ne korespondas al la amplekso de tiu studkampo. Tamen, la distingo pri specoj de parolantoj proponita de la aŭtoro manifestiĝas kiel esplorinda kontraste al la tradicia Esperanto-movada entuziasmo pri denaskuloj. Miner reliefigas interesan ambiguecon pri la statuso de Esperanto-denaskuloj. Unuaflanke, laŭ la Esperanto-movada perspektivo, kalkuli je denaskuloj estas kerna argumento kiu helpas pravigi Esperanton kiel naturan lingvon (Colling 2015: 27; Koutny 2015; Stria 2015a). Aliflanke, esperantistoj kaj esperantologoj efektive ne kalkulas je denaskuloj kiel fidindaj por aŭtoritati pri laŭgramatikeco aŭ kontraŭgramatikeco de esperantaj frazoj – por tiaj asertoj oni sin turnas al la Akademio kaj al aliaj prestiĝaj lingvo-uzantoj.

La plej rekta respondo al la problemoj levitaj de Miner venis de Marcos Kramer (2020). Tamen, Kramer proponas matematikan solvon al problemo

5 En la angla, *speakers-from-birth* kaj *native speakers*, respektive.

6 Tio ne signifas ke, laŭ Chomsky, Esperanto ne estas lingvo entute, sed tutsimple ke Esperanto ne konformas al la kutima funkciado de lingvoj prezentita de la ĉomskia aliro.

lingvistika – pere de la uzado de algoritmoj kaj metodo de fakto-trovado – kaj ĉi tiu propono ŝajne nur efike solvus la problemon se oni signife simpligas ĉi tiun problemon.

Parte konsentante pri la punktoj elvokitaj de Miner, Sabine Fiedler (2006, 2012) agnoskas, ke la statuso de Esperanto-denaskuloj ne egalas tiun de indiĝena parolanto de etna lingvo. Tamen, ŝi prave asertas ke lingvistiko estas studkampo pli ampleksa ol la ĉomskia aliro, tiel ke la manko de indiĝenaj parolantoj ne nuligas priesperantan lingvistikon. Por argumenti por tio, pluraj esperantologoj pravigas lingvistikajn alirojn al Esperanto alimaniere – ekzemple, fokusiĝante je la gramatika reguligo farita de Esperanto-parolantaj beboj kaj infanoj laŭ fonologia, morfologia kaj sintaksa perspektivoj (Versteegh 1993; Corsetti kaj aliaj 2004; Lindstedt 1999, 2006; Abrahamsen 2015; Werneck 2021; inter aliaj).

Inter la supremenciitaj aŭtoroj kies verkoj aperis post 2010, bedaŭrinde malmultaj rekte engaĝiĝas – ĉu favore, ĉu kontraŭ – kun la debato pri denaskaj kaj indiĝenaj parolantoj. Kiel Detlev Blanke (2015) konstatis, tia relativa manko de diskutado de argumentoj de aliaj esperantologoj okazigas grandajn perdojn. Oni daŭre reinventas la radon kaj kontentiĝas pri evoluigi Esperantologion irante en cirkloj, anstataŭ sekvi plurdirekten pere de rektaj primalkonsentaj fakaj debatoj.

Konkludaj rimarkoj

Surbaze de la analizo de fakartikoloj kaj konferencoj kiuj koncernas Interlingvistikon kaj, ĉefe, Esperantologion, ĉi tiu artikolo montras kelkajn el la pluraj vojoj lastatempe sekvatajn de Esperantologio kaj kelkajn vojojn sekvindajn. Ĉar ĉi tiu studo baziĝas plejparte sur kvalitaj esplormetodoj, mi pridiskutas nur kelkajn verkojn kaj debatojn, tiel ke mi nek argumentas ke Esperantologio kiel tuto konformas al ĉi tiu analizo nek provizas elĉerpan rigardon de la studkampo.

La esperantologiaj spacoj pri konferencoj kaj eldonaĵoj en Esperanto, kadre de Esperantujo, helpas firmigi la studkampon kaj, samtempe, permesas al esperantologoj senti sin hejme ĉirkaŭate de esperantistoj, tiel ke iliaj kontribuoj cirkulas kvazaŭ ekskluzive en tiuj komfortaj medioj. Tiu pejzaĝo prave estas tia: faka kono produktita kun kaj pri esperantistoj efektive devas esti debatita kun esperantistoj. Tamen, kiel antaŭe konstatite, Esperantologio konsistas grandparte je teoriaj, analizaj kaj metodologiaj aliroj el lingvistikaj kaj humanistikaj studkampoj. Do, kial Esperantologio ne pli ofte influas spacojn ekster Esperantujo kaj reasertas tiujn spacojn kiel ankaŭ siajn? Por instigi esperantologojn fari tion, ĉi tiu artikolo pridiskutis kvar esplorojn kiuj ilustras la potencialon de Esperantologio eksteriri strikte esperantologiajn randojn.

La danĝera lingvo bele montras kian agopovon havas lingvoj, kiel transnaciaj parolkomunumoj kreiĝas kaj firmiĝas malgraŭ la distanco, kaj kiel militoj, persekutoj kaj diktaturoj manifestiĝas kiel fenomenoj kaj politikaj kaj lingvaj. Laste, la eltrovoj de Lins reprezentis signifan impulson por komuniki rigore sciencajn studojn al la ĝenerala publiko, kuraĝigante ne-esperantologiajn esperantistojn ankaŭ pripensi Esperanton tra historia perspektivo.

Intertempe, *La serĉado de la perfekta lingvo* delonge rolas por inkluzivi Esperanton (kaj, konsenkvence, Esperantologion) en la mapon de fakaj debatoj pri lingvoj, internacia komunikado, kaj moderna historio. Tiu verko montras ke ne gravas kiom granda aŭ malgranda estas Esperantujo: gravas ke ĝia daŭra ekzistado diras ion pri homaj pensoj kaj agoj pri tutmondiĝo, egalrajteco kaj inkluziveco.

La *-ata/-ita*-diskuto, siavice, estis unu el la kernaj okazaĵoj kiuj alportis al Esperantologio polemikan kaj science informitan debaton. La estiĝo de tiu malkonsento helpis montri al Esperantologio ke, malgraŭ la limigita grandeco de tiu studkampo, eblas ke fakuloj pensu malsame kaj defendu kontraŭstarajn teoriajn vidpunktojn sen ruini la studkampon. Tiaj polemikoj ne minacas la koherecon de la studkampo: male, ili plivigligas ĝin, kuraĝigante rektajn dialogojn kiuj ofte mankas en Esperantologio.

Laste, la teoria distingo pri denaskaj kaj indiĝenaj parolantoj ja havas potencialon por instigi similan debaton de esperantologoj. Ĝi rekte kontraŭas la movadan argumenton pri la naturlingva statuso de Esperanto surbaze de la ekzistado de denaskuloj. Kiel la ekzemplo de *La danĝera lingvo* montras, se Esperantologio devas efektive dialogi kun la esperantistoj kiuj konsistigas ĝiajn fakajn esplorojn, kontrastigi la perspektivojn de Miner kaj de la Esperanto-movado pri tiuj temoj estus sekvinda vojo. Krome – kaj plej eksterordinare – tiu distingo aperas kiel originala kontribuo al ĉomskiecaj teorioj pri formala lingvistiko. Kial, do, tia kontribuo estas limigita al Esperantologio?

La ekzisto de science informitaj malkonsentoj estas nepra trajto de scienca agado, kaj la valorigo de dialogo kaj eblaj polemikoj inter esperantologiaj perspektivoj povus evidenti la manierojn laŭ kiu Esperantologio povas pli amplekse kontribui al paradigmo-ŝanĝoj en la studkampoj kiuj originigis ĝin. La kreskanta instituciigo de Esperantologio ĉirkaŭ fakrevuoj kaj konferencoj forte kontribuis por ke ĉi tiu studkampo firmiĝu en aparta maniero, kadre de Esperantujo. La lingvaj ideologioj sur kiuj Esperanto baziĝas strebas por pli da dialogo inter homoj el malsamaj naciaj, lingvaj kaj kulturaj fonoj, kaj eble tiel Zamenhof esperis ke homoj interkompreniĝu. Tamen, interkompreniĝo ne postulas interkonsenton. Influata de la idealigita sinteno de Esperantujo, Esperantologio tendencas minimumigi disputemajn debatojn: dum esperantologoj dialogas, foje iliaj plej signifaj kontribuoj estas silentigitaj.

Dankoj

Mi dankas The Leverhulme Trust kaj Esperantic Studies Foundation pro la financaj rimedoj kiuj permesis al mi dediĉi tempon al tiu esploro. Krome, mi ankaŭ dankas Humphrey Tonkin, Fernando Pita kaj la pritaksantojn pro la atenta legado kaj komentoj al antaŭaj malnetoj de ĉi tiu manuskripto.

Bibliografio

- Abrahamsen, J. E. (2015). Compound stress in a Norwegian variety of Esperanto. *Nordic Journal of Linguistics*, 38(2), 245-284.
- Akademio de Esperanto. (1967). *Aktoj de la Akademio 1963-1967. Oficiala bulteno de la Akademio de Esperanto n°9*. Rotterdam: Akademio de Esperanto.
- Alcalde, J. (2022). *Esperanto i anarquisme: els orígens (1887-1907)*. Barcelona: Edicions Malcriàs d'Agràcia.
- Barandovská-Frank, V. (2020). *Interlingvistiko: Enkonduko en la sciencon pri planlingvoj*. Poznań: Wydawnictwo Rys & Uniwersytet im. Adama Mickiewicza.
- Blanke, D. (2003). Interlinguistics and Esperanto studies: Paths to the scholarly literature. *Language Problems and Language Planning*, 27(2), 155-192.
- Blanke, D. (2015). How not to reinvent the wheel: The essential scholarly literature in Interlinguistics and Esperantology. *Interdisciplinary Description of Complex Systems*, 13(2), 200-215.
- Blanke, D., Lins, U. (Red.). (2010). *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Bourdieu, P. (1975). The specificity of the scientific field and the social conditions of the progress of reason. *Social Science Information*, 14(6), 19-47.
- Calhoun, C. (1993). "New social movements" of the early nineteenth century. *Social Science History*, 17(3), 385-427.
- Caligaris, I. (2021). *Unu lingvo por ĉiuj, unu lingvo de neniu lando: Surkampa esploro pri la esperantaj identecoj*. Pisa: Edistudio.
- Carreiro Neto, P. (1933). La formoj 'ata' kaj 'ita'. *Lingva Kritiko*, 1(13), 2-4.
- Castells, M. (2015). *Networks of outrage and hope: Social movements in the Internet age*. Cambridge: Polity Press.
- Chomsky, N. (2006). *Language and mind*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Colling, I. (2015). Languages, so fascinatingly (im)perfect, so creatively logical. *Język, Komunikacja, Informacja*, 10, 15-31.

- Corsetti, R., Pinto, M. A., Tolomeo, M. (2004). Regularizing the regular: The phenomenon of overregularization in Esperanto-speaking children. *Language Problems and Language Planning*, 28(3), 261-282.
- Couturat, L., Leau, L. (1903). *Histoire de la langue universelle*. Paris: Hachette.
- De Hoog, H. A., Gregor, D. B., Kalocsay, K., La Colla, S., Lapenna, I., Nakamura, T., Pumpr, T., Régulo, J., Schwartz, R., Sonnenfeld, E., Waringhien, G. (1961). *La Zamenhofa Esperanto: Simposio pri -ata/-ita*. La Laguna: J. Régulo.
- della Porta, D., Diani, M. (2006). *Social movements: An introduction*. Oxford: Blackwell.
- Duranti, A. (1997). *Linguistic anthropology*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Durkheim, É. (1912). *Les formes élémentaires de la vie religieuse: Le système totémique en Australie*. Paris: Presses Universitaires de France.
- Eco, U. (1993). *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea*. Roma / Bari: Laterza.
- Eco, U. (1995). *The search for the perfect language*. J. Fentress (Trad.). Oxford / Cambridge, MA: Blackwell Publishers Ltd.
- Eco, U. (1996). *La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo*. D. Mistretta (Trad.). Pisa: Edistudio.
- Fians, G. (2021). *Esperanto revolutionaries and geeks: Language politics, digital media and the making of an international community*. Cham / London / New York: Palgrave Macmillan.
- Fiedler, S. (2006). Standardization and self-regulation in an international speech community: The case of Esperanto. *International Journal of the Sociology of Language*, 177, 67-90.
- Fiedler, S. (2012). The Esperanto *denaskulo*: The status of the native speaker of Esperanto within and beyond the planned language community. *Language Problems and Language Planning*, 36(1), 69-84.
- Fishman, J. A. (1965). Who speaks what language to whom and when? *La Linguistique*, 1(2), 67-88.
- Forster, P. G. (1982). *The Esperanto movement: Contributions to the sociology of language*. The Hague: Mouton.
- Frazer, J. (1908). *The scope of social anthropology. A lecture delivered before the University of Liverpool, May 14th, 1908*. London: Macmillan and Co.
- Garvía, R. (2015). *Esperanto and its rivals: The struggle for an international language*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.
- Gobbo, F. (2020). *Introduction to interlinguistics*. München: Grin Verlag.
- Gobbo, F. (2021). The language ideology of Esperanto: From the world language problem to balanced multilingualism. En M. Tosco, & M. Tamburelli (Red.). *Contested languages: The hidden multilingualism of Europe* (p. 247-268). Amsterdam: John Benjamins.

- Gotoo, H., Kimura, G. C., Vergara, J. A. (Red.). (2018). *En la mondon venis nova lingvo: Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins*. New York: Mondial.
- Jaffe, A. (1996). The Second Annual Corsican Spelling Contest: Orthography and ideology. *American Ethnologist*, 23(4), 816–835.
- Jaffe, A. (1999). *Ideologies in action: Language politics on Corsica*. Berlin / New York: Mouton De Gruyter.
- Jung, T. (1932). La 'problemo' ata-ita. *Lingva Kritiko*, 1(5), 1-2.
- Jung, T. (1960). *La kunmetitaj verboformoj. Pri la absurda ata-ita-problemo*. Scheveningen: Heroldo de Esperanto.
- Jung, T. (1961). *La kunmetitaj verboformoj. Pri la absurda ata-ita-problemo. Dua volumeto*. Scheveningen: Heroldo de Esperanto.
- Kalocsay, K. (1933). Pri la pasivaj participoj. *Lingva Kritiko*, 1(17), 2-3.
- Koutny, I. (2015). A typological description of Esperanto as a natural language. *Język, Komunikacja, Informacja*, 10, 43-62.
- Koutny, I., Stria, I., Farris, M. (Red.). (2021). *The intercultural role of Esperanto*. Poznań: Wydawnictwo Rys & Uniwersytet im. Adama Mickiewicza.
- Kramer, M. (2020). Ĉu tamen eblas pri-Esperanta lingvoscienco? Aŭ Kiel difi ni kiuj estas la kompetentaj parolantoj kiuj determinas la lingvan regularon? *Esperantologio / Esperanto Studies*, 1(9), 13-26.
- Kuhn, T. (1996). *The structure of scientific revolutions*. Chicago: University of Chicago Press.
- Lindstedt, J. (1999). *Hejma vortaro: Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Lindstedt, J. (2006). Native Esperanto as a test case for natural language. *SKY Journal of Linguistics*, 19 (Special Supplement), 47-55.
- Lins, U. (1973). *La danĝera lingvo: Esperanto en la uragano de persekutoj*. Kyoto: L'Omnibuso.
- Lins, U. (1990). *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Moskvo: Progreso.
- Lins, U. (2016a). *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Lins, U. (2016b). *Dangerous language: Esperanto under Hitler and Stalin*. H. Tonkin (Trad.). London: Palgrave Macmillan.
- Lins, U. (2017). *Dangerous language: Esperanto and the decline of Stalinism*. H. Tonkin (Trad.). London: Palgrave Macmillan.
- Marullo, S., Meyer, D. S. (2004). Antiwar and peace movements. En D. A. Snow, S. A. Soule, & H. Kriesi. (Red.). *The Blackwell companion to social movements*. Oxford / Cambridge, MA: Blackwell Publishers Ltd.
- Mauss, M. (1923 [2007]). *Essai sur le don. Forme et raison de l'échange dans les sociétés archaïques*. Paris: Presses Universitaires de France.

- Miner, K. (2010). La neebleco de priesperanta lingvoscienco. En: D. Blanke, & U. Lins (Red.). *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin* (p. 259-270). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Miner, K. (2011). The impossibility of an Esperanto linguistics. *Inkoj, Interlingvistikaj Kajeroj*, 2(1), 26-51.
- Neergaard, P. (1942). La Esperantologio kaj ties disciplinoj: Taskoj kaj rezultoj. En P. Thorsen (Red.). *Tra densa mallumo: Esperanto-eseoj pri movado kaj lingvo* (p. 37-64). Kopenhago: Laborista Esperanto-Klubo.
- Popper, K. (1959). *The logic of scientific discovery*. New York: Basic Books.
- Rowbottom, D. (2011). Kuhn vs. Popper on criticism and dogmatism in science: A resolution at the group level. *Studies in History and Philosophy of Science*, 42, 117-124.
- Régulo, J. (1961). La punkto de danĝero. En H. A. De Hoog, D. B. Gregor, K. Kalocsay, S. La Colla, I. Lapenna, T. Nakamura, T. Pumpr, J. Régulo, R. Schwartz, E. Sonnenfeld, & G. Waringhien (1961). *La Zamenhofa Esperanto: Simpozio pri -ata/-ita* (p. 3-16). La Laguna: J. Régulo.
- Reta Vortaro. 2022. *Reta Vortaro de Esperanto*. <https://reta-vortaro.de/>
- Schubert, K. (1989). Interlinguistics: its aims, its achievements, and its place in language science. En K. Schubert (Red.). *Interlinguistics: Aspects of the science of planned languages* (p. 7-44). Berlin / New York: Mouton de Gruyter.
- Snow, D. (2013). Social movements. En D. A. Snow, D. della Porta, B. Klandermans, & D. McAdam (Red.). *The Wiley-Blackwell encyclopedia of social and political movements* (p. 588-592). Chichester / Malden: Wiley-Blackwell.
- Spillman, W.J. (1909). Progress of the international language Esperanto. *Science*, 30(771), 478-479.
- Stocking Jr, G. W. (1987). *Victorian anthropology*. New York: The Free Press.
- Stria, I. (2015a). Esperanto as a natural language. *Język, Komunikacja, Informacja*, 10, 32-42.
- Stria, I. (2015b). Esperanto speakers: An unclassifiable community? En W. Malec, M. Rusinek, & A. Sadowska (Red.). *Challenging ideas and innovative approaches in theoretical linguistics* (p. 175-189). Lublin: Catholic University of Lublin.
- Szerdahelyi, I. (1976). La semantika modelo de Esperanto. En Z. Tišljár (Red.). *Internacia Lingvistika Simpozio. Kumrovec 1975* (p. 85-148). Zagreb: Internacia Kultura Servo.
- Tonkin, H. (1987). One hundred years of Esperanto: A survey. *Language Problems and Language Planning*, 11(3), 264-282.
- Tonkin, H. (2006). *Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Tonkin, H. (2007). Recent studies in Esperanto and interlinguistics: 2006. *Language Problems and Language Planning*, 31(2), 169-196.

- Tonkin, H. (2022). Esperanto: esploraj prioritatoj. *Esperantologio / Esperanto Studies*, 3(11), 86-107.
- Tonkin, H, Fettes, M. (1996). *Esperanto studies: An overview*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Urla, J. (1988). Ethnic protest and social planning: A look at Basque language revival. *Cultural Anthropology*, 3(4), 379-394.
- Versteegh, K. (1993). Esperanto as a first language: language acquisition with a restricted input. *Linguistics*, 31, 539-555.
- Waringhien, G. (1932). Letero al Teo Jung pri la pasivaj participoj. *Lingva Kritiko*, 1(9-10), 6-7.
- Waringhien, G. (1967). Demandaro pri la uzado de la participoj en la Fundamento. En Akademio de Esperanto. *Aktoj de la Akademio 1963-1967. Oficiala bulteno de la Akademio de Esperanto n°9* (p. 24-31). Rotterdam: Akademio de Esperanto.
- Weber, M. (1978). *Economy and society*. E. Fischhoff, H. Gerth, A. M. Henderson, F. Kolegar, C. Wright Mills, T. Parsons, M. Rheinstein, G. Roth, E. Shils, & C. Wittich (Trad.). Berkeley: University of California Press.
- Werneck, E. (2021). Denaskismo en Brazilo: Speciala dulingvismo. En I. Koutny, I. Stria, & M. Farris (Red.). *The intercultural role of Esperanto* (p.117-133). Poznań: Wydawnictwo Rys & Uniwersytet im. Adama Mickiewicza.
- Wood, R. E. (1979). A voluntary, non-ethnic, non-territorial speech community. En W. Mackey, & J. Ornstein (Red.). *Sociolinguistic studies in language contact: Methods and cases* (p. 433-450). The Hague / Paris / New York: Mouton.
- Woolard, K. (2016). *Singular and plural: Ideologies of linguistic authority in 21st century Catalonia*. Oxford: Oxford University Press.
- Wüster, E. (1955). La terminoj “esperantologio” kaj “interlingvistiko”. *Esperantologio*, 1, 209-214.
- Zamenhof, L. L. (2001). *Paroladoj*. Tyresö: Inko.

Pri la aŭtoro

Guilherme Fians estas socia antropologo, esploristo ĉe la Universitato de St Andrews kaj estrarano de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj. Lia plej lastatempa libro estas *Esperanto Revolutionaries and Geeks: Language Politics, Digital Media and the Making of an International Community* (Palgrave Macmillan, 2021).

Retadreso: gmf7@st-andrews.ac.uk

ORCID-numero: 0000-0002-5223-3362

About the author

Guilherme Fians is a social anthropologist, Leverhulme Research Fellow at the University of St Andrews and member of the Board of Directors of the Centre for Research and Documentation on World Language Problems. His latest monograph is *Esperanto Revolutionaries and Geeks: Language Politics, Digital Media and the Making of an International Community* (Palgrave Macmillan, 2021).

Sobre o autor

Guilherme Fians é antropólogo, trabalha como Leverhulme Research Fellow (pesquisador associado) na University of St Andrews e é membro da diretoria do Centre for Research and Documentation on World Language Problems. Seu livro mais recente é *Esperanto Revolutionaries and Geeks: Language Politics, Digital Media and the Making of an International Community* (Palgrave Macmillan, 2021).

Against the exceptionalism of Esperanto (and Esperanto Studies): First steps towards an ethnography of this research field

Abstract: Several Esperanto Studies scholars have built on archival research and ethnographic fieldwork to explore the Esperanto-speaking community. With these research techniques, one can better understand, for instance, how and why people effectively use the language and how Esperantists perceive terms such as *Homaranismo* and *samideano*. Yet, what could we find by using ethnographic fieldwork, as well as literature review and archival research, to study Esperanto Studies? An initial approach shows how this research field is broadly based on consensus. This contrasts with the main disciplines that feed Esperanto Studies with theories – such as linguistics, sociology, anthropology, history and literature studies – which develop through constant clashes between scholars who support different methodological and theoretical approaches. Based on the analysis of publications and conferences on Esperanto Studies and Interlinguistics, this article analyzes how Esperanto Studies in many ways follows the idealized attitude of the Esperanto-speaking community regarding mutual understanding – which, in turn, leaves aside the more controversial and contentious features that characterize scientific debates. Ultimately, I argue for a more direct dialogue – and (why not?) more controversies – between Esperanto Studies perspectives, so that this research field can contribute more broadly to the disciplines that originated it.

Keywords: Interdisciplinarity; Scientific progress; Theory in Esperanto Studies; Linguistics; Ethnography; Scientific controversies.

Contra o excepcionalismo do Esperanto (e da Esperantologia): Primeiros passos para uma etnografia deste campo de pesquisa

Resumo: Diversos pesquisadores do Esperanto têm usado a pesquisa em arquivos e o trabalho de campo de cunho etnográfico para explorar a comunidade esperantista. Com essas técnicas, pode-se entender melhor, por exemplo, como e por que as pessoas efetivamente usam a língua e o que esperantistas entendem por *Homaranismo* e *samideano*. No entanto, o que poderíamos encontrar usando o trabalho de campo, assim como a revisão bibliográfica e a pesquisa em arquivos, para estudar a Esperantologia? Uma abordagem inicial mostra como esse campo de pesquisa é amplamente baseado no consenso. Isso contrasta com as principais disciplinas que alimentam a Esperantologia – como a linguística, a sociologia, a antropologia, a história e os estudos literários – as quais se desenvolvem por meio de embates entre diferentes abordagens metodológicas e teóricas. A partir do estudo de publicações e conferências de Esperantologia e Interlinguística, este artigo analisa como a Esperantologia segue, de diversas maneiras, a atitude idealizada da comunidade esperantista em relação ao entendimento mútuo e pacífico – o que, por sua vez, deixa de lado os aspectos mais controversos que caracterizam o debate científico. Por último, defendo um diálogo mais direto – e (por que não?) mais dissensos – entre as perspectivas da Esperantologia, para que este campo de pesquisa possa contribuir mais amplamente para as disciplinas que o originaram.

Palavras-chave: Interdisciplinaridade; Progresso científico; Teoria em Esperantologia; Linguística; Etnografia; Controvérsias científicas.